

# Mia partopreno je la 103-a Universala Kongreso de Esperanto

Julio 2018



\*Ĵaŭdon la 26an de julio, post tagmeze, mi surteriĝis en Lisbono. Claire kaj Frajno akceptis min en la flughaveno. Mi loĝis kun roĉel-grupo tre simpatia dum mia restado.

\*Vendredo, ni vizitis la urbon kune... Kvartalo Alfama per la fama tramo 28





La Torre de Belém  
kaj « la Mosteiro  
dos Jeronimos »


La turo situis meze  
de la Tage antaù la  
seismo en 1755







\*Sabaton, la 28an de julio, komenco de la 103a Universala Kongreso de Esperanto. La ĉefa kongresejo staris en la Fakultato pri Juro de la Universitato de Lisbono

Por aliri La Fakultaton , ni trapasis parkon, ne tre malproksime de la flughaveno. Ni povis vidi kaj aŭdi aviadilojn.



\*Dimanĉon je la 10a, La solena inaŭguro kaj Nacia Vespero okazis en la Salono Zamenhof, (Ciliseu dos Recreios), meze de la urbo. Ni malkovris Portugalujon, pere de ties folkloroj, norda, centra, suda ...kaj aŭdis multe da paroladoj






\*Dimanĉon, mi elektis kanti kun la internacia Koruso. Ĉiun posttagmezon ni trejnadis. La etoso estis tre simpatia. Ankaŭ mi promenis en la centro de la urbo dum la Fotopromeno, sed mia fotilo rompiĝis.





\*Lundon, mi deziris scii la historion de portugalujo. Do, mi aŭdis prelegon pri historio, lingvo, monumentoj de la lando. Sed estis iomete enue. Feliĉe, mi partoprenis la kantatelieron de Kajto.






Ĉiu matene mi partoprenis la paroligajn lecionojn kun Sylvain.





\*Merkredon, estis la tuttagaj ekskursoj. Mi elektis Koimbron, mondokonata pro ĝia universitato fondita en 1290, la unua en Portugalujo kaj unu el la plej malnovaj en la mondo.

Ni vizitis la Universitaton, la preĝejon grandiozan kaj promenis preter la antikvaj stratoj. Ni ne vizitis longtempe ĉar la urbo estis je 200 km de Lisbono. Tro longa busvojaĝo. Kia domaĝo !





\*Ĵaŭdon. Mi ne scias kiam, sed mi perdis mian identigan Karton...



... certe en la metropola fervojo. Mi bezonis tion por reveni al Francio. Do mi iris al Policejo dufoje, poste al Francia Ambassadejo, al Konsulejo... multe da busoj, tramoj, metroo... piedoj. Tiamaniere, mi vizitis Lisbonon sed mi ne aŭdis prelegojn, kiujn mi dezirus aŭskulti.





Tamen , mi povis aŭskulti  
Koncertojn de jOmO, de  
Kajto, de Patro kaj filino...,  
kuraĝigi la ludantojn en la  
oficiala piedpilka matĉo.  
La esperantaj ludandoj  
perdis.



\*vendredon vespere, okazis la « Internacia Arta Vespero ». Gravega momento ! Ni aŭdis kantojn de multe da landoj, kaj kun la Internacia Esperanto KORuso, mi kantis 3 kanzonojn : « Festakanto », « Akordaj », kaj « ni kunkantu »..Iomete impresa.

\*Sabaton la 4a de aŭgusto... finiĝis la Kongreso... Multe da partoprenantoj jam foriris. Je la deka, ni aŭdis multe da paroladoj. Kelkaj esperantistoj prezentis la venontajn Kongresojn : Lahtio, de 20-27 julio 2019, okazos la 104a Universala Kongreso de Esperanto, kaj en Montrealo, de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto 2020, la 105a Kongreso.



Je la tagmezo, la fino... Mi adiaŭis Victor kaj Claudette. Mi deziris resti 2 pliajn tagojn por plu viziti Lisbonon. .. Ekspozicion pri Escher, la muzeon Calouste Gulbenkian, kaj Sintran. Estos nova rakonto ...